

## JESUO VERE NASKIĜIS EN LA 25-A DE DECEMBRO

Kial estis fiksita la dato de Naskiĝo de la Sinjoro je la 25-a de decembro, ne estis ĝis nun klara. Oni eliradis el larĝe disvastigita konvinko, ke ĝi estis difinita sen historia bazo, por elpuŝi influon de pagana solenado de la vintra solstico. Sed la lastaj sciencaj malkovroj montras, ke tiel ĝi ne estas.

Danke al dokumentoj el Kumrano (Qumran) oni povis precize difini, ke Jesuo naskiĝis en la 25-a de decembro. Ĝi estas unika malkovraĵo, kiu ne povas esti dubigita kiel apologetika, ĉar ĝin realigis Judo, doĉento de Jerusalema Universitato Shemarjahu Talmon. Se Jesuo naskiĝis la 25-an de decembro, tiam la virgulina koncipiĝo okazis naŭ monatojn pli frue. Kaj la kristanaj kalendaroj solenas la 25-an de marto kiel feston de Anunziacio. Sed el la evangelio laŭ sankta Luko ni scias, ke la ĉefanĝelo Gabrielo anoncis al Maria kiel signon: „Ankaŭ via parencino Elizabeta koncipis en sia maljuneco kaj estas jam en la sesa monato...“ Antikvaj orientaj eklezioj festas inter la 23-25-a de septembro koncipon de Johano la Baptisto. La vicordo de la datoj baziĝis sur tradicio, kiun oni ne povis verigi. Tion ni pensis ĝis antaŭnelonge.

Sed ni devas eliri ĝuste de la koncipio de Johano la Baptisto. La evangelio laŭ Luko komencas per historio de maljunaj geedzoj Zeĥarja kaj Elizabeta, kiu jam paciĝis kun sia senfrukteco, kio estis unu el la plej grandaj malfeliĉoj en Israelo. Zeĥarja estis pastro el pastra grupo de Abija. „Kaj dum li plenumis sian pastradon antaŭ Dio en la vico de sia grupo“, aperis al li anĝelo Gabrielo anoncinte al li, ke spite de alta aĝo li kun Elizabeta havos filon – „kaj vi donos al li la nomon Johano... li estos granda antaŭ la Sinjoro.“

Jes, estas bone al ni konata tiu historio, sed ke tiu indiko de Luko „en pastra grupo de Abija“ estas tiel decidiga, tion ne opiniis eĉ grandaj ekzegezistoj dum multaj jarcentoj.

En malnova Israelo estis pastroj dividitaj je 24 grupoj kaj ili alternis laŭ konstanta ordo ĉe templaj oferoj dufoje en la jaro. Ni sciis, ke la pastra grupo de Zeĥarja, nome de Abija, estis la oka. Sed neniu sciis, al kiu tempo apartenis lia etapo. Nur profesoro Shemarjahu Talmon sukcesis helpata de aliaj ekspertoj kaj precipe per analizo de skribulaĵoj el kumrana biblioteko precizigi kronologian ordon, en kiu alternis 24 pastraj grupoj ĉe la oferoj en jerusalema templo. Estis ĉi tie verŝajna tradicio de la orientaj kristanoj, kiu datumas anoncon al Zeĥarja, ke al li naskiĝos filo, inter la 23-25-an de septembro. Kaj tiu probableco proksimiĝis al la certeco, ĉar pluaj esploristoj, sugestitaj per malkovraĵo de la profesoro Talmon, rekonstruis radoaron de tiu tradicio kaj konkludis, ke tiu tradicio devenas rekte el la unuatempa hebrea-kristana komunumo en Jerusalemo. Tre antikva kaj ankaŭ treege persistema estas la tradicio de la orientaj eklezioj, kiel estis tio cetere konfirmita jam ĉe multaj aliaj okazoj.

Kio do aspektis kiel ia pia mito, subite surprenas mirindan, novan versimilecon. Ĉeno de la eventoj sin disetendas en intervalo de 15 monatoj. En la septembro la anĝelo de la Sinjoro Gabrielo anoncis al Zeĥarja naskiĝon de la filo. La evangeliisto Luko precizigas: „Kiam finiĝis la tagoj de lia pastrado, li foriris en sian domon. Kaj post tiuj tagoj lia edzino Elizabeta gravediĝis“ (Luk 1, 23-24). En la marto post ses monatoj sekvas anonco de la anĝelo Gabrielo al Maria kaj ŝia „Fiat“. Tri monatojn poste naskiĝis Johano la Baptisto; la katolika eklezio ĝin festas en la 24-a de junio. Post ses monatoj naskiĝas Jesuo. Kaj per tiu ĉi lasta evento ni atingas al la 25-a de decembro. Tiu tago do ne estis difinita per nura hazardo.

Al la sciencistoj, kiel estis profesoro Shemarjahu Talmon, sufiĉis la informajo de Luko, ke Zeĥarja estis el la pastra grupo de

Abija, kaj la kumranaj papirusoj, por ke estu konfirmita tradicio de la unuatempa jerusalema komunumo kaj ankaŭ dato de naskiĝo de Jesuo – la 25-a de decembro.

Kaj kio estas Kumrano? En kelkaj grotoj de Kumrano proksime de Morta Maro trovis iu paŝtisto en la jaro 1947 tutan vicon da papirusoj, legeblajn ideografajn skribrulaĵojn. Ĝis la jaro 1956 oni trovas kaj vendadis pluajn. Temas pri 750 tekstoj en hebrea, aramea (tiel parolis mem Jesuo) kaj greka lingvoj. Ili datiĝas ekde la 3-a jarcento antaŭ Kristo ĝis la 1-a jarcento post Kristo. Bibliis-

to Sac. Gallagher SJ sur unu papiruso difinis tekston el evangelio de Marko, kiu konfirmas, ke la Evangelio laŭ Sankta Marko estis skribita antaŭ likvido de esenoj, juda sekto, kiu en Kumrano havis sian sidejon, tio estis ĝis la jaroj mallonge post la morto de Jesuo en la jaroj 40-50 post Kristo. Unu parto de la papirusoj estis ĝis la jaro 1991 deponita en Israelo. Publikigo de ĉiuj tekstoj de 38 volumoj el Kumrano estis finita en Oksfordo nur en la jaro 2002. ■

*www.radiovaticana.cz (14.8.2003)*  
*Transprenita el Světlo n-ro 48/2009*